

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-10

n-ro 351

Unuiĝintaj Nacioj kaj tradukado



Katalunio: ĝenerala
striko: vojoj kaj trajnoj
blokitaj

Sirio deklaris aliĝon al
Pariza Interkonsento

Aplikaĵo mastrumas
propran magazenon

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Unuiĝintaj Nacioj kaj tradukado

Internacia Tradukada Tago p. 03

Katalunio: ĝenerala striko: vojoj kaj trajnoj blokitaj

Alvoke de pluraj sendependismaj organizaĵoj p. 04

Aplikaĵo mastrumas propran magazenon

Ciferecaj servoj por propraj magazenaj kupeoj nun helpas senigi sin de malnovaj posedaĵoj p. 05

Sirio deklaris aliĝon al Pariza Interkonsento

Reprezentanto de Sirio deklaris la decidon en la 23a Konferenco de Partioj Aliĝintaj al la Kadra Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatŝanĝiĝo p. 06

Hodiaŭe

Friedrich SCHILLER; Jon MIRANDE; Tamás FALU; kaj Zofia NAŁKOWSKA p. 07

Unuiĝintaj Nacioj kaj tradukado

La 24-an de majo ĉi-jare, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis ege signifan rezolucion rilate la uzadon de lingvoj en tiu organizaĵo. Tiu rezolucio estis direktita al tradukado. Ĝi laŭdis la profesian tradukadon:

“Profesia tradukado, kiel fako kaj kiel arto, ludas gravan rolon en apogado de la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kunigante la naciojn, faciligante dialogadon, interkomprenon kaj kunlaboron, kontribuante al evoluigo kaj la fortigo de monda paco kaj sekureco.”

La rezolucio, en siaj enkondukaj alineoj, aludis al la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiuj, laŭ la rezolucio “rekonas, ke ĉiuj kulturoj kaj civilizoj povas kontribui al, kaj estas nemalhaveblaj povigantoj de, daŭripova evoluigo.”

Ĝi asertis, ke “respekto al la monda kultura kaj lingva diverseco estas esenca premiso de antaŭenigo, ene de Unuiĝintaj Nacioj, de la spirito de malfermiteco, egaleco kaj dialogado,” kaj ĝi rekonis “la rolon de multlingvismo ... kiel kernan valoron de la Organizaĵo, kaj ĝian praktikon kiel rimedon por antaŭenigi, protekti kaj konservi la diversecon de lingvoj kaj kulturoj tutmonde.”

Kaj, fine kaj ĉefe, ĝi deklaris la 30-an de septembro “Internacia Tradukada Tago,” kiam oni festu la rolon de tradukistoj kaj levu la publikan konscion pri la valoro de tradukado.

Universala Esperanto-Asocio, jam de jaroj, atentigas Unuiĝintajn Naciojn, ke ĝi ne donas sufiĉan atenton al lingva diverseco, malgraŭ sia oficiala lingva politiko difinanta la formalan lingvouzon ene de la organizaĵo mem. UN emas akcepti la helpon de tradukistoj kaj interpretistoj sen agnoski ilian

gravecon. Ekster la organizaĵo, en sia rilato al mondaj problemoj, UN malofte levas la demandon pri lingva diverseco kiel faktoron en planado kaj realigo de programoj pri evoluigo: la ekspertoj faras siajn planojn pere de la grandaj lingvoj, precipe la angla, kaj supozas, ke apenaŭ necesas konsideri la fakton, ke la homoj al kiuj tiuj planoj ofte estas direktataj, nome la malriĉuloj kaj la simplaj homoj, ne povas efike reagi ĉar ili ne regas la lingvon de la planantoj. Nia Asocio, pere de siaj UN-reprezentantoj, daŭre emfazas tiun grandan lingvan fendon inter la planantoj kaj la planatoj.

La nova atento al tradukado estas do faktoro tre pozitiva en la evoluo de lingvaj demandoj ĉe UN. Esperantistoj eble asertos, ke, uzante Esperanton, oni povus solvi la tutan problemon alimaniere. Ili ne malpravas – sed ĝis UN rekonos la plenajn implicojn de



lingva diverseco, ĝi ne venos al konsiderado de radikalaj solvoj. Nunmomente, Esperanto estas solvo kiu serĉas problemon: ĝis UN rekonos la problemon, ĝi ne venos al konsiderado de solvoj.

Helpe de la provoko de UEA, oni fondis antaŭ kelkaj jaroj la Studogrupon pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, en kiu membras pluraj fakuloj pri lingva politiko, inkluzive de esperantistoj. Tiu grupo estas forumo por pridiskuti

lingvajn demandojn kaj konsciigi UN-funkciulojn pri la graveco de tiuj problemoj. Ni daŭre laboros tiucele, ĝis UN pli klare komprenos la dimensiojn de la problemo.

Intertempe, ni festu ĉiujare, kune kun tiuj aliaj konsciantoj pri lingvaj diferencoj, la tradukistoj, la kreskon de konscio, flanke de UN, pri la lingva diverseco.

Informilo de Esperanto por UN, n° 31

Katalunio: ĝenerala striko: vojoj kaj trajnoj blokitaj

Alvoke de pluraj sendependismaj organizaĵoj, aŭtovojoj kaj fervojoj estis blokitaj ĉi-merkrede [08 nov 2017].

«Vaga general».

Alvoko al ĝenerala striko estis lanĉita en Katalunio, ĉi-merkrede, de la sendependisma intersindikato CSC, kiu protestas kontraŭ la fakto, ke Madrido faciligis la foriron de entreprenoj instalitaj en Katalunio, kun la celo malfortigi ekonomie la regionon. Ĝi ankaŭ denuncas ["kondamnas"] la malstabilecon de la laboro.



reage al la policaj perfortoj, kiuj makulis la tagon de la referendumo pri memdetermino, multaj vojoj kaj aŭtovojoj estis blokitaj. Interalie la aŭtovojo AP-7, kiu laŭiras la hispanan mediteranean marbordon, kaj interrilatigas Andaluzion al la franca landlimo, kaj la aŭtovojo A2, kiu interrilatigas

Barcelonon al Madrido. La

kataluniaj vojaŭtoritatoj kalkulis kvindekon da blokadoj. Ankaŭ en kelkaj gravaj aŭtovojoj de Barcelono, la trafiko estis haltigita. TGV, kiu iras de Barcelono ĝis Liono (Francio),

kaj kiu devis alveni je la 12a horo kaj 26 minutoj, devis retroiri pro ĉeesto de manifestaciantoj sur la fervojo, laŭ la nacia fervoja kompanio *Renfe*.

Neniam Milito Inter Ni

Kvankam la striko havis malpli da efiko ol tiu de la 3a de oktobro, dekretita

Aplikaĵo mastrumas propran magazenon

Ciferecaj servoĵ por propraj magazenaj kupeoj nun helpas senigi sin de malnovaj posedaĵoj.

De la ŝtrumpo ĝis la komputilo la averaĝa eŭropano de hodiaŭ posedas proksimume 10 000 objektojn. Ĝuste en la Silicia Valo kiu ja alikaze ne nepre estas konata kiel loko de rezigno pri konsumo, nun novkoncepta

entrepreno disvolvas kontraŭan koncepton pri tiu moderna manio pri posedaĵoj. Estonte malnovaj posedaĵoj ne plu kolektiĝu en la kelo, sed en modernega magazeno kun granda nombro da kupeoj por la koncernaj posedaĵoj de la klientoj.

Se objekto troviĝas en tia magazeno, ĝi povas esti liverata al la kliento post elvoko helpe de aplikaĵo ene de kelkaj horoj. Se oni ne bezonas objekton oni povas lue disponigi ĝin al aliaj uzantoj kontraŭ mem elektita kotizo. La prizorga entrepreno prenas por si en tiu kazo sufiĉe abundajn 50 procentojn de la luprezco. La aplikaĵo havas valorprijugan funkcion, sur cifereca mapo oni povas vidi je kiu distanco de la propra loko

troviĝas la dezirata objekto. Ĝis nun la servo estas disponebla nur en Kalifornio, sed se oni fidus pri la merkataj mekanismoj, tiam oni povas supozi ke post kelkaj monatoj troviĝos imitanto ekzemple en Berlino.



Intertempe pli ol 100 000 objektoj troviĝas en la cifereca katalogo de la mastruma entrepreno por la magazenoj. Oni povas trovi tie kvazaŭ ĉion por lupreno. Tenisa batilo kostas 5 dolarojn por tago, elektra gitaro

haveblas por 10 dolaroj, tendo por dudek. Do jen ĉiuj aĵoj kiujn oni iam nepre bezonis kaj kiuj nun nur okupas lokon. Oni povas konsideri tiun servon kiel reuzigo de restaĵoj de la abundeca socio. Tio bone kongruas kun la moderna mito pri la "cifereca nomado" kiu sin separas laŭeble de multaj posedaĵoj kaj bezonas por la vivo ne plu multe krom aero, amo kaj rapida interreta konekto. "Ni volas ŝanĝi la koncepton pri posedaĵoj en la mondo", klarigas kunfondinto de la magazinmastruma servo. Do estu aliro portempa anstataŭ propraĵo por ĉiam.

Tio unuflanke estas konsekvenca: Post kiam la "kundivida ekonomio" dum la pasintaj jaroj kondukis al tio, ke homoj disponigis aŭ sian loĝejon, aŭ sian

aŭtomobilon aŭ sian laborforton al aliaj, nun oni okupiĝas pri la cetero. Aliflanke tamen la koncepto estas ankaŭ iom laŭvola. Ĉu oni nepre devis trovi pluan negoc-ideon, ĉar ne plu estas tiom da servoj kiuj ankoraŭ ne estas ofertataj en la merkato.

Nome la kvin grandaj entreprenoj de la cifereca mondo ŝajne adoptis negoc-koncepton kiun oni ĝis nun konis nur

de ĉinaj fabrikantoj de malaltprezaj produktoj, nome ke oni klonas multpromesan koncepton ene de mallongega tempo. Do ne estus mirinde ke baldaŭ ekzemple Fejsbuko ofertos tiam ludonan servon, se la koncepto de la nova entrepreno el la Silicia Valo estos sukcesa.

Esperanta Retradio

Sirio deklaris aliĝon al Pariza Interkonsento

Sirio decidis aliĝi al la Pariza Interkonsento pri Klimatsanĝiĝo.

Reprezentanto de Sirio deklaris la decidon en la 23a Konferenco de Partioj Aliĝintaj al la Kadra Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝiĝo en la germana urbo Bonno.



Nick NUTTALL, proparolanto de la Sekretariejo de la Kadra Konvencio de la UN pri Klimatsanĝiĝo, konfirmis la novaĵon al la gazetaro. Siria ministro pri medio Wadah KATMAWI diris, ke Sirio subskribos dokumenton pri la aliĝo kaj

plenumos siajn promesojn kiel eble plej baldaŭ. Li samtempe vokis la internacian komunumon plenumi siajn promesojn al Sirio kaj liveri subtenon.

NUTTALL diris, ke poste Sirio devas sendi la enlandan ratifon de la Pariza Interkonsento al la stabejo de la UN en Nov-Jorko por konservo.

La 12an de decembro, 2015 en Parizo,

proksimume 200

partioj aliĝintaj al la kadra konvencio unuanime adoptis la Parizan Interkonsenton.

Yu Ĉina Radio Internacia



Friedrich SCHILLER

La germana poeto, dramisto kaj historiisto Johann Christoph Friedrich SCHILLER [Johan kristof fridriĥ ŝiler], laŭ la Fundamento (vd. FG, 16-a regulo) Ŝillero aŭ Ŝiller', naskiĝis je la 10-a de novembro 1759 en *Marbach* kaj mortis je la 9-a de majo 1805 en Vajmaro.

En Esperanto aperis pluraj tradukoj.

Vikipedio

Jon MIRANDE

Jon MIRANDE Aiphasorho (10-a de novembro 1925 - 28-a de decembro 1972), eŭska verkisto.

En Esperanto aperis: *La Baptofilino*.

Vikipedio



Tamás FALU

Tamás FALU [tamAŝ], hungare FALU Tamás, Esperante Tomaso FALU estis hungara verkisto kaj poeto. Naskiĝis, kiel *Balassa Lajos* la 10-an de novembro 1881 en *Kiskunfélegyháza* kaj mortis la 13-an de julio 1977 en Ócsa.

En Esperanto aperis novelo kaj poemo en *Hungara Antologio*.

Vikipedio

Zofia NAŁKOWSKA

Zofia NAŁKOWSKA (naskiĝis la 10-an de novembro 1884 en Varsovio; mortis la 17-an de decembro 1954 en Varsovio) estis pola verkisto, publicisto kaj parlamentano.

En Esperanto aperis: *Medalionoj*.

Vikipedio

